der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

17. Jahrgang Nr. 107 (3/1981) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Post la X-a Partia Kongreso

Pli altan kvaliton kaj efikecon en la agado

La esperantistoj de GDR kompreneble kun granda atento sekvis la laboron de la Xa Partia Kongreso, aprile en Berlin. Tia profunde grava en la vivo de Germana Demokratia Respubliko evento ne povas ne tuŝi la estontan agadon de la nove fondota „Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR". Dum sia IIIa Centra Konferenco la esperantistoj de GDR en Karl-Marx-Stadt abunde diskutis la ĉefajn agadcelojn por la 80aj jaroj kaj klopodis apliki la ĉefajn rezultojn de la Partia Kongreso al sia agado. Kiujn taskojn ni devas nepre solvi estonte? Jen kelkaj el ili:

1. Oni estonte ne plu povas permesi grandan disproporcion inter investo de energio kaj la rezultoj. Do temas pri la plialtigo de la efikeco de la agado per pli alta kvalito. Kursoj komenciĝantaj kun 30 kaj finiĝantaj kun 5 homoj ne estas tro efikaj, des pli, ĉar ne ekzistas garantio, ke tiuj 5 ankaŭ stabile ekagados en niaj grupoj. Do nepre oni devas **decide** plialtigi la kvaliton de la kursoj, por ke pli da homoj finu ilin. Devas fariĝi pli allogaj la klubvesperoj, por ke la membroj havu kaŭzon viziti ilin kaj teni la rilatojn al la movado.

2. Ni nepre devas decide alpaŝi la problemon de membro-varbado. Ne plu estas permeseble, ke dum jaroj distriktoj aŭ subdistriktoj havas konstantan aŭ eĉ malgrandiĝantan nombron da membroj.

3. Alia problemo, tre grava por kvalita ŝanĝo de nia agado, estas plisistemigo kaj plibonigado de la tuta informa agado (ĉu per gazetaro, aliaj amaskomunikiloj, prelegoj, ekspozicioj aŭ aliamaniere). Ni devas alparoli ne ĉiun sed tiujn, kiuj povus esti interesataj kaj gajneblaj por bonkvalita stabila kunagado.

4. Nepre estas necesa pligrandigi la bazon ne nur laŭ kvanto sed ankaŭ laŭ geografia vidpunkto. Ankoraŭ ekzistas kelkaj distriktoj kaj multaj subdistriktoj, kie Esperanto estas aŭ nekonata aŭ apenaŭ vivetas. Nemotiveblajn diferencojn ĉirilate ni devas superi.

5. Evidenta, plue, estas la neceso plialtigi la lingvan kapablon de la membroj kaj ilian fakan scion, por ke ili pli kaj pli efike povu agadi en la internaciaj sferoj, kio ja, finfine, estas la ĉefa sfero de esperantistaj aktivecoj.

AMIKECKONTRAKTO INTER GDR KAJ USSR: KONTRIBUO DE ESPERANTISTOJ

La amikeco kaj diversflanka kunlaboro estas la kerno de la rilatoj inter GDR kaj USSR. Jam en la registara deklaro de la 12-a de oktobro 1949 ĉefministro Otto Grotewohl emfazis, ke la amikeco kun Sovet-Unio estas premiso ne nur por la prospero, sed ankaŭ por la ekzisto mem de la germana popolo kaj ŝtato. En septembro 1955 estis subskribita Kontrakto pri rilatoj inter GDR kaj USSR. Ĝin anstataŭis, post naŭ jaroj Kontrakto pri amikeco, kiu validis pli ol 11 jarojn kaj grave kontribuis al plia interproksimiĝo de ambaŭ ŝtatoj.

La 7-an de oktobro 1975 kamaradoj L. Breĵnev kaj E. Honecker subskribis novan Kontrakton pri amikeco, kunlaboro kaj reciproka helpo inter Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj kaj Germana Demokratia Respubliko. En la kontrakto ambaŭ ŝtatoj sin devigas, interalie, helpadi al la kunlaboro inter registaraj kaj sociaj organizaĵoj en la sferoj de la scienco, kulturo kaj arto, klerigo, sanprotekto, turismo kaj sporto, televido kaj radio, t. e. fakte en ĉiuj sferoj de la socia aktiveco. La unuan fojon en la internacia praktiko, la ŝtataj instancoj promesas stimuli personajn kontaktojn inter civitanoj de ambaŭ landoj.

Por realigado de la celoj de la amikèckontrakto gravan rolon ludas partneraj ligoj inter distriktoj de GDR kaj provincoj de USSR, inter apartaj loĝlokoj. Ĉiuj GDR-aj distriktoj havas partnerojn en Sovetio. Esprimplena ekzemplo estas la ekzistantaj de 1968 partneraj ligoj inter distrikto Potsdam kaj belorusia provinco Minsk. Estas praktikataj diversaj formoj de la kunlaboro: vizitoj de oficialaj delegacioj, vojaĝoj de laboruloj por interŝanĝo de sperto, organizado de komunaj sciencaj konferencoj, renkontiĝoj de specialistoj, interŝanĝo de laborbrigadoj, profesoroj kaj studentoj, gastigado de amatoraj artkolektivoj, sportaj teamoj, junulaj kaj infanaj grupoj, trajnoj de amikeco, liverado de informa kaj ilustra materialo por ekspozicioj, gazetaro kaj radio, k. a.

Amikajn kontaktojn havas ankaŭ esperantistoj de Minsk kaj Potsdam. Estis ellaborita Interkonsento pri amikeco kaj kunlaboro inter Esperantogrupoj de Minsk kaj Potsdam.

La interkonsento preskribas, ke la Esperanto-grupoj regule informu unu la alian pri la planoj, spertoj kaj rezultoj de la agado, interŝanĝu informmaterialojn pri atingoj de GDR kaj Belorusa SSR en la socialisma kaj komunisma konstruado, preparu ekspoziciojn, prelegojn kaj artikolojn lige kun naciaj festoj, instigu komunan kaj individuan korespondadon de esperantistoj, peru kontaktojn de neesperantistoj, serĉu eblecojn por reciprokaj vizitoj laŭ oficialaj kaj privataj invitoj.

---

6. Por atingi ĉion-ĉi, kaj multon alian, ĉi-tie ne menciitan, necesas plene internaciigi la aktivecojn de ĉiu Esperanto-grupo en Kulturligo de GDR. Oni apliku la lingvon pli ofte, pli sisteme kaj pli altkvalite. La novaj „Gvidlinioj“, kiujn akceptis la IIIa Konferenco, donos por ĉio-ĉi la ĝustan bazon. En n-ro 4/81 de „der esperantist“ ni detale raportos pri la rezultoj de la Konferenco kaj prezentos „bazan agadprogramon“ por la distriktoj, subdistriktoj kaj grupoj.

La pasintaj du jaroj donis bonajn ŝancojn por la aktiva kunlaboro de la esperantistoj. La jaro 1979 estis jubilea por Belorusa SSR, kiu celebris la 60-an datrevenon post proklamo de la respubliko, kaj por GDR, kiu festis la 30-jariĝon. Lige kun la jubileo de BSSR, minskaj esperantistoj preparis albumon de bildkartoj pri la belorusia ĉefurbo (kun eksplikaj surskriboj en la germana kaj internacia lingvoj) kaj sendis al la potsdamaj amikoj ĝin kaj informmaterialon pri Belorusio, ĝia historio, ekonomio, kulturo.

Siaflanke, la potsdamaj partneroj sendis informajn kaj demonstrajn materialojn, kiuj rakontas pri diversaj aspektoj de la vivo en GDR. Surbaze de tio, en Minsk estis preparitaj ekspozicioj, dediĉitaj al la soci-ekonomiaj atingoj de GDR kaj al la GDR-a junularo.

Okaze de la jubileo de Germana Demokratia Respublika Minska Esperanto-Klubo aranĝis kunvenon, en kiu partoprenis estraranoj de la respublika kulturdomo de sindikatoj (la sidejo de la klubo), membroj de aliaj amatoraj grupoj, gastoj-neesperantistoj. En la kunvenejo estis eksponataj german- kaj ruslingvaj libroj pri GDR kaj kunlaboro inter niaj landoj, albumoj, turismaj prospektoj, bildkartoj. Apartan intereson vekis, plejparte donace ricevitaj, esperantaĵoj el GDR, inter kiuj elstaris „Nuda inter lupoj“, „Trigroŝa romano“, esperantologiaj artikolaroj, lernolibroj kaj vortaroj. Ne mankis ankaŭ specimenoj de „der esperantist“, GDR-aj numeroj de „Paco“, „Esperanto-informoj“ el Potsdam. Gratul- kaj salutkartoj kompletigis la ekspozicion.

Sammonate minskanoj akceptis grupon de GDR-aj esperantistoj, inter kiuj estis prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto Rudolf Hahlbohm. La grupo, plejparte el Dresden, vojaĝis per trajno de amikeco tra Minsk kaj Moskvo al Leningrad. Helpe de agentejo „Intourist“ estis organizita esperantista renkontiĝo, dediĉita al la 30-jariĝo de GDR.

Grava evento, kies sekvoj daŭras ĝis nun, estis vizito de la aŭtoro de ĉi artikoleto al Potsdam laŭ invito de prezidantino de Distrikta Laborrondo Esperanto Hanna Scheffs. La vojaĝo havis abundan programon kaj estis tre sukcesa. Neforgeseble impresis la turismaj valoroj de la lando, antaŭ ĉio vidindaĵoj de Potsdam, Dresden kaj la ĉefurbo de GDR. Sed aparte signifaj estis, jen laŭplanaj, jen okazaj, renkontiĝoj kun civitanoj de la respubliko. Dum la estado en GDR ne estis forgesita grava celo — realigo de la interkonsento inter la partneraj Esperanto-grupoj. Partoprenante kunvenon de potsdamaj esperantistoj, mi informis pri la sovetia esperantista movado post la fondo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, rakontis pri Minska Esperanto-Klubo, respondis demandojn. Kun la estraro de Distrikta Laborrondo Esperanto ni precizigis direktojn kaj formojn de la plua kunlaboro.

Sekve de la sukcesa vojaĝo, kreskis la interesiĝo pri GDR inter minskaj esperantistoj. Tio influis al ĉi-jara agadprogramo, kies kerno fariĝis aranĝoj, ligitaj kun GDR. Inter tiuj estas la serio de prelegoj pri vizititaj urboj, vespero, dediĉita al la 35-a datreveno de la venko super la faŝismo, prelego pri Potsdama konferenco (lige kun datreveno). Por la aranĝoj estis uzitaj, kiel ilustra materialo, libroj, albumoj, diapozitivoj, veturigitaj rezulte de la vojaĝo al GDR.

En julio de la kuranta jaro okazis vica renkontiĝo de la prezidantoj de la partneraj Esperanto-kolektivoj el Potsdam kaj Minsk. Ĝi havis lokon en

Zlatko Tišlar

Nova instrumetodo: Ŝanco al sukceso!

Dum la kunsidoj de la Konsulta Lerneja Komisiono de UEA en la Lucerna Kongreso 1979 mi estis taskigita ellabori ĉi tiun informon kaj dissendi ĝin al ĉiuj landaj asocioj invitante ilin kompletigi ĉi tiun sperton per siaj similaj spertoj por ke en la sekva UK ni povu detale dediĉi nin al fenomeno: rapidaj kursoj de Esperanto. Mi, do, esperas ke ĉi tiu materialo servos kiel instigilo kaj ke mi ricevos plurajn kontribuaĵojn el kiuj mi preparos apartan materialon.

Ni ĉiuj scias ke Esperanto estas simpla kaj pluroble (!) pli facila ol aliaj lingvoj. Sed kial ni tion praktike ne sukcesas montri? Kial efektive ekzistas nur tre malmultaj homoj kiuj bone ĝin regas kaj kial niaj kursoj finiĝas per magraj rezultoj? Kial, finfine, mezuradoj de Szerdahelyi kaj Frank diras ke ĝi estas nur 20 aŭ 30 procentojn pli facila ol aliaj lingvoj? Ni ne povas kredi tion, ni scias ke la vero ne estas tia, sed kial ne eblas tion pruvi?

En Zagrebo Studenta Esperanto-Klubo kaj Internacia Kultura Servo dum lastaj dek jaroj okazigas ĉiujare 20—40 kursojn por ĉiuj aĝoj. La rezultoj principe estis malkontentigaj. Ĉiusezone anonciĝas nur en elementaj lernejoj 300—400 infanoj. En la sekva lernojaro restas nur kelkdeko por daŭrigi en la dua ŝtupo. El cento da plenkreskuloj jare restas fine de la kursoj 10—20. Plejmulto fuĝas jam dum la kurso tiel ke la finon atingas kaj venas al la ekzamenoj 10—40 % de la komencintoj. Ankaŭ tiam, dum la ekzameno, prezentiĝas vere malsufiĉaj scioj, ĉefe malkapablo paroli, mem krei frazojn.

Kial la konataj avantaĝoj de Esperanto ne estas efektivigeblaj en praktiko? Ekzistas nur du respondoj: aŭ Esperanto ne estas simpla kaj facila kiel ni kredas, aŭ la instrumetodoj kiujn ni uzas estas malĝustaj! Antaŭ 4 jaroj en IKS oni decidis eksperimenti. Ni rimarkis ĉe la elementlernejaj infanoj relativan progreson en la unua jaro, sed en la postaj eĉ regreson (ne nur stagon). La situacion ne sukcesis venki eĉ la plej kapablaj instruistoj. Ni supozis ke la ĉefa kaŭzo estas tro longaj tempodistancoj inter opaj instruhoroj tiel ke la infanoj, ne lernante hejme, pli multe forgesas

---

(resto de paĝo 51)

la antaŭolimpika Moskvo kaj estis tre amikeca. La gastoj de Moskvo vizitis la sidejon de ASE kaj informis la respondecan sekretarion A. Berjoza pri la rezultoj kaj perspektivoj de la kunlaboro inter potsdamaj kaj minskaj esperantistoj.

La interkonsento pri amikeco kaj kunlaboro inter Esperanto-grupoj el Minsk kaj Potsdam validas du jarojn. Ni estas konvinkitaj, ke kune kun similaj interkonsentoj jam ekzistantaj (Leningrad kaj Dresden) kaj subskribotaj, ĝi ĉiam pli utile kontribuados al la realigo de la amikeckontrakto inter USSR kaj GDR.

Laŭ artikolo de Valerij Šiško,
prezidanto de Minska Esperanto-Klubo

dum la periodo inter du kurshoroj ol ili lernas dum la horo mem. Nature, la malprogreso ilin malkuraĝigas kaj ili forlasas iom post iom niajn vicojn. Ni elektis grupon kiu en la unua lernojaro komencis per 24 infanoj kaj nun estis en la dua jaro de lernado (1976) nur ankoraŭ 10 infanoj 13–14 jaraĝaj. Anstataŭ daŭrigi tradicie per du horoj semajne, ni intensigis la kurson dum du semajnoj po unu horo ĉiutage. Dum tiu periodo la instruisto tute ne instruis novajn sciojn sed zorgis nur pri konversaciaj ekzercoj. En ĉiu horo ĉiu infano havis 4 minutojn por rerakonti iun rakonton aŭ prezentitan temon. La instruisto nombris la frazojn uzitajn dum la 4 minutoj kaj la plej parolemaj estis premiataj. Post la du semajnoj la infanoj kapablis paroli memstare. Poste oni daŭrigis la normalan kurson du foje semajne. Ĉiuj dek infanoj restis en la movado ĝis nun, ok el ili partoprenis unu aŭ plurajn fojojn TEJO-kongresojn kaj kelkaj mem gvidas kursojn.

Montriĝis intertempe ke la uzataj lerniloj (en elementaj lernejoj: „Esperanto I“ de I. Szerdahelyi) estas tro ampleksaj kaj tempoperdaj, ĉar por gajni kompletan Esperantan strukturon necesas pluraj jaroj, kaj la lernantoj estas tro senpaciencaj por tiom atendi. Ŝajnas ke plejmulto da aŭtoroj kopiis la metodojn de aliaj fremdaj lingvoj: lerni malrapide gramatikon kaj lerni multajn vortojn!

Tial Kroatia Esperanto-Ligo formis en 1978 novan Lernejan Komisionon kaj konsiderinte ĉiujn tiujn spertojn ĝi ellaboris bazan lernilon por novspecaj Esperanto-kursoj. La celo de la reformo: **DUM MINIMUMA TEMPO ATINGI PAROLKAPABLON.** La malnova programo por A-kurso postulis: scii la tutan gramatikon kaj mil radikojn. La nova postulas: *scii tiom da gramatiko kaj tiom da radikoj kiom sufiĉas por efektivigi ĉiutagan simplan konversacion,* sed povi tion *praktike bone utiligi.* La Komisiono laboris duonjaron, esploris la plej modernajn konojn de teorio pri informoj kaj tiujn pri Esperanto kaj ĝi konstatis ke por tio sufiĉas koni gramatikon sen participoj kaj sen duono de ne tro ofte uzataj afiksoj. Krome, oni ne bezonas pli ol 350 Esperantajn radikojn por krei pli ol 2000 vortojn kio prezentas ĉirkaŭ 80 % de la tuta lingva materialo uzata.

Tiel minimumigita lernmaterialo ebligas ŝpari tri kvaronojn de la tempo en kurso uzata, kaj tiun tempon oni nun povas uzi nur por parolaj ekzercoj. Krome, eblas la kurson ankaŭ mallongigi! Tio estas gravega en la tempo kiam ĉiuj urĝas kaj ne povas elspezi multe da tempo por lerni ion ne multe utilan en praktika vivo. La nova materialo estis tuj eksperimente aplikita fine de 1978 en okmembra grupo de plenkreskuloj. La kurso okazis ĉiutage dum du semajnoj — du horojn tage — entute 22 horojn. Okazis tuj poste ekzameno en kiu montriĝis ke la rapidlernantoj kapablis paroli duoble pli bone en Esperanto ol kursanoj, kiuj sekvis 4-monatan kurson tradician (2 foje 2 horoj en semajno). La Komisiono finprilaboris sian projekton kaj atingis plian gravan konstaton: por ebligi la kursgvidadon al homoj kiuj mem ne estas bonegaj lingvokonantoj, necesas disdividi lernolibron je du partoj: unu por la lernantoj kaj alia por la kursgvidantoj kun detalaj indikoj kion fari dum la instruhoroj. La kvinmembra pedagogia grupo ellaboris la du librojn. En la libro por instruisto estas detalaj informoj pri ĉiu minuto de la dekleciona kurso. Estas ene multaj eblaj demandofrazoj, ke la instruisto ne devu perdi tempon elpensante la ekzemplofrazojn kaj troveblas tie aliaj indikoj kion fari en opa parto de la lecionoj. La lernolibro por lernantoj enhavas lecionojn kaj ekzercaron necesan en la horoj kaj hejme kun mallonga trarigardo de lernata gramatiko kaj vortareto. Laste, en novembro 1979, okazis la plej kuraĝa eksperimento.

La saman materialon unu instruisto instruis al 3 studentinoj dum 3 tagoj (vendredon, sabaton kaj dimanĉon). Ili ellernis la tutan materialon planitan por dekkvin horoj (ĉiutage po 5 horoj) dum nur 10 horoj! La scio estis absolute kontentiga kaj la parolkapablo preskaŭ la sama kiel ĉe tiuj kiuj lernis du semajnojn (restis nur iom pli granda interferenco, nome ili miksis iom pli vortoformojn de antaŭe sciataj lingvoj kun tiuj de Esperanto, ekz. regardis... rispondis...). La grupo estis tre malgranda kaj tial la tempo necesa estis tiel mallonga, krome, temis pri lingvostudentinoj kiuj konis jam 1 aŭ du fremdajn lingvojn, sed tamen jam nun eblas konkludi: *Tiaj semajnfinaj 10 — 15 horaj kursoj povas transdoni sufiĉe kompletan scion al malgrandaj grupoj (ideale 5 — 8 personoj) kiu ebligas bazan konversacikapablon. Sed, ĉefe, tiaj kursoj lasas enrigardon en la kompletan E-strukturon kaj kaptas la lernantojn por la movado. Poste necesas ebligi al ili aktivan partoprenon en la kluba vivo, eventuale daŭrigi la lernadon kaj antaŭ ĉio plani vojaĝojn al niternaciaj E-aranĝoj.*

Tiajn kursojn pro ilia mallonga daŭro sukcese finas 90 — 100 % de la komencintoj.

Kiel jam menciite la nova kursmaterialo havis ankaŭ la intencon ebligi kursgvidadon al komancantoj por ke oni povu tiel pli rapide disvastigadi la movadon sur terenoj kie ni ne havas E-societojn. En respubliko Kroatio jam unu jaron oni aplikas la novan sistemon kaj la plej sukcesaj estis Osijek-anoj kaj Koprivnic-anoj kiuj dum dek monatoj kreis dekojn da kursoj en la du urboj kaj vilaĝoj ĉirkaŭ ili kun pli ol 500 lernantoj. Jen la ŝanco por amaseco!

La instrumaterialoj estas dulingvaj (kroatserbaj kaj Esperantaj). Tial povas ĝin uzi ankaŭ mendantoj ekster Jugoslavio kaj facile adapti al siaj lingvoj. Volonte ni disponigos ilin kaj post la apliko ricevus sugestojn kaj kritikojn por povi ellabori ankoraŭ pli bonan materialon kiu devus finfine eluzi la avantaĝojn de Esperanto — ebligi al amasa publiko lerni ĝin tre rapide!

Plej freŝaj mezuradoj de vortofteco uzata en kelkaj (ĉefe grandaj) lingvoj montris ke tre malmultaj vortoj estas amase uzataj, dum la granda plimulto de ekzistantaj vortoj en ĉiu lingvo estas uzata tre tre malofte. La rezultoj en ĉiuj lingvoj estas proksimume la samaj: *ĉirkaŭ 2000 plej oftaj vortoj troviĝas en 80 % de la kompleta teksto.* Ekz. konata Braun-korpo enhavis 1 milionon da vortoj (oni elektis tekstojn el 15 prozaj branĉoj de literaturo kaj ĵurnalismo, kaj ĉiuj kune ili havis milionon da vortoj). La plej ofta vorto estis „the“ (70 000), poste sekvis „of“, „and“, „to“, „a“ ... Kiam oni nombris kiom da fojoj entute aperis en tiu miliono de vortoj 2000 vortoj kun la plej granda ofteco, montriĝis ke ili aperis en 78 % de la tuta teksto. Aliaj 48 000 vortoj (ĉar en tiu miliono da vortoj aperis entute 50 406 diversaj vortoj) aperis en la tuta tekstokvanto nur per 22 %. 2000 plej oftaj vortoj mezuritaj prezentis kunmetaĵojn, gramatikaĵojn, la samajn vortojn en diversaj kazaj formoj ktp tiel ke en Esperanto tiuj 2000 vortoj estas absolute senpene fareblaj el 350 plej oftaj morfemoj (radikoj kaj gramatikeroj). En la nuna materialo la 350 vortoj elektitaj kiel la plej oftaj estas elektitaj el la sperto kaj ne per mezurado (iomete oni komparis kun la Braun-analizo). Tamen, por science scii, kiuj vere estas la plej oftaj radikoj en Esperanto, la aŭtoro de ĉi tiu artikolo faras komputilesploron pri 100 000 vorta materialo surbendigita en la kongresoj de 1979, kaj tio estos la unua esploro bazita sur parolata kaj ne skribita teksto.

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado VI

(daŭrigo el „der esperantist“ 2/1981)

3.2. Diskutpartneroj, iliaj ĉefaj interesoj kaj argumentoj

Kiel ni jam konstatis, la diversaj diskutpartneroj distingiĝas per tute malsama intelekta profilo, do interesoj, preferoj, profesiaj kvalifikiĝoj k. s.

Ĉe ili renkontiĝas diversaj argumentoj, kiuj estas influitaj de tiu ilia intelekta profilo.

Ni donu kelkajn ekzemplojn.

3.2.1. La gejunuloj

La ĉefa intereso de gejunuloj direktiĝas al la praktika aspekto de Esperanto, ties uzebleco por internaciaj (prefere iom aventuraj) rilatoj. Korespondado, fremdaj landoj kaj popoloj trovos ilian intereson. Sed la juna homo ankaŭ estas malferma al humanismaj idealoj, se ili estas adekvate prezentitaj kaj ne kiel enuaj moralaĵoj.

Kontraŭargumentoj kaj duboj povos esti i. a.:

— malgranda aplikosfero de la lingvo
— pli forta pozicio de aliaj lingvoj, kiel ekz. de la angla
— tro malgranda rolo de Esperanto en la junulara movado.

Ŝajne ne eblas distingi ĉefajn interesojn kaj argumentojn ĉe pliaĝuloj aŭ maljunuloj, ĉar ĉe ili jam elformiĝis la intelekta profilo, kiu influas la rilaton al Esperanto.

Pro tio ni mencios kiel prototipojn „filologon“, la „natursciencu lon“ kaj la „politikulon“.

3.2.2. La filologo

Tiu intelektula tipo inkludu ĉiujn ĉefe filologie interesitojn (do ankaŭ ekz. instruistojn). Emocia rilato al la lingvo plej ofte estas enkalkulenda.

La *ĉefa intereso* estas i. a. pri:

— la diversaj aspektoj de la monda lingvo-problemo, principe la lingvistika,
— la lingvaj ecoj kaj kapabloj de Esperanto

Kontraŭargumentoj kaj duboj ofte temas i. a. pri:

— artefariteco de la lingvo kiel negativa trajto
— manko je esprimforto ĉar morta lingvo, kiu ne havas „nacian animon“
— duboj pri la evolukapablo de Esperanto
— disfalo en dialektoj.

Oni miras, kiom forte, eĉ subkonscie, ankoraŭ kunefikas malnoviĝintaj lingvistikaj konceptoj ĉe eĉ tre modernaj lingvistoj, se temas pri planlingvoj.

Ĉirilate estas necese, ke tamen ne veras ofte aŭdata aserto, ke la profesiaj lingvistoj principe emas kontraŭi la ideon de planlingvo. Almenaŭ la evoluo de la lingvoscienco dum la lastaj 4—5 jardekoj donis pli kaj pli da teoria bazo por kompreni la fenomenon de planlingvo.

Tre aktualas la konstato de la fama lingvisto Otto Jespersen: „Estus granda eraro supozi, ke la profesiaj lingvistoj en sia tuteco estas kontraŭuloj de konstruitaj lingvoj. Pli ĝuste estus diri, ke tiuj inter ili, kiuj plej multe okupiĝis pri la problemo, pleje favoras la ideon“ [40]).

3.2.3. La natursciencul o

Tiu intelektula tipo inkludas ankaŭ teknikistojn, inĝenierojn kaj entute naturscience interesitajn homojn.

Ĉe ili ni povas atendi malpli mistikan rilaton al ĉio kio estas instrumento, servonta al la raciigo kaj plisimpligo de laborprocesoj.

La *ĉefa intereso* direktiĝas i. a. al:

- La racia aspekto de la monda lingvo-problemo (ekzemple la ekonomio)
- la eblecoj de praktika aplikado en scienco kaj tekniko
- la problemo de fakterminologio.

Kontraŭargumentoj kaj duboj ofte direktiĝas al:

- duboj pri ebleco enkonduki internacian lingvon (i. a. pro la pozicio de angla)
- manko de fakliteraturo kaj scienca aplikateco.

3.2.4. La politikulo

Tiu intelektula tipo inkludas precipe politikajn funkciulojn kaj sociajn agantojn sed ankaŭ politikistojn, instruistojn pri politikaj fakoj k. s.

Ilia *ĉefa intereso* direktiĝas i. a. al:

- la politikaj, ekonomiaj kaj sociklasaj aspektoj de la monda lingvo-problemo
- la rilatoj inter naciaj lingvoj kaj internacia lingvo principe kaj al Esperanto speciale
- la leninisma nacia politiko en sia apliko al la internacia sfero
- eblecoj de la politika kaj sociutila apliko de Esperanto (i. a. instrumento de politika informado, de klasbatalo k.t.p.)
- la edukaj valoroj de Esperanto por la personeco (ekz. eduko al internaciismo)

Kontraŭargumentoj kaj duboj ofte temas pri:

- duboj pri tio, ĉu Esperanto ne forpremos la naciajn lingvojn
- miskomprenoj pri kosmpolitismo (t. e. identigo de Esperanto kaj ĝia parolantaro kun difinita koncepto aŭ ideologio)

3.2.5. La „mezulo“

Kompreneble neniam oni trovos en la praktiko la unuopajn tipojn en ideala formo. Nur pro metodaj kaŭzoj ni elstarigis iujn ĉefajn intelektajn profilojn. La unuopaj tipoj povas domini, sed sendube ankaŭ ĉiam aliaj temoj kaj argumentoj, ankaŭ tiaj ĉi-tie nemenciitaj, trovas la intereson de la reala diskutpartnero. Do en la praktiko ni pli ofte trovos la „mezulon“.

(daŭrigota)

Notoj

[40]) O. Jespersen: Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928, p. 215

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO.

Oktobro, 1980.

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivigo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: „Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u“.

Prezidanto: W. Auld
Sekretario: D-ro A. Goodheir

Esperanto-Verband gegründet

Im Rahmen der III. Zentralen Konferenz der Esperantisten im Kulturbund der DDR, die vom 22. – 24. 5. 1981 in Karl-Marx-Stadt stattfand, verkündete der Vizepräsident des Kulturbundes, Prof. Dr. Eduard Steiger, die vom Präsidium beschlossene Gründung des „Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR“. In Anwesenheit von Gästen aus Bulgarien, der ČSSR, Polen, Rumänien, der UdSSR, Ungarn und einer Delegation des Esperanto-Weltbundes wählten die Delegierten den Zentralvorstand des neuen Verbandes.

Vorsitzender wurde Hans Heinel. Rudolf Hahlbohm wurde zum stellv. Vorsitzenden und Dr. Detlev Blanke zum Sekretär gewählt. Dem Arbeitsausschuß gehören weiterhin an: Linde Knöschke, Manfred Arnold, Jürgen Hamann, Michael Lennartz, Siegfried Linke und Werner Pfennig.

Die Konferenz beschloß Leitsätze für die Arbeit des Verbandes und nahm eine Erklärung an.

In „der esperantist“ 4/81 wird ausführlich über die Konferenz berichtet.

William Auld: Prezidanto de la Akademio

Fine de oktobro 1979 elektiĝis nova prezidanto de la Akademio de Esperanto, la lingvogvida kaj – konserva institucio de Esperanto. La konfidon de la akademianoj, de la 45 membroj voĉdonis 39, ricevis la skoto William Auld, gvida verkisto en la Esperanta literaturo, vicprezidanto de UEA, iama redaktoro de la revuo „Esperanto", redaktoro de „Brita Esperantisto", eseisto, verkinto de pluraj sukcesaj lernolibroj de la Internacia Lingvo. La internacie fama botanikisto, membro de pluraj naciaj sciencaj akademioj, prof. d-ro Paul Neergaard, restas unu el la vicprezidantoj. Nova vicprezidanto fariĝis prof. d-ro Stojan Ĝuĝev (Bulgario), internacie konata muzikologo. Nova sekretario de la Akademio fariĝis d-ro Albert Goodheir (Britio), poeto, tradukisto kaj eldonisto.

La sekciojn de la Akademio gvidas prof. Neergaard (bibliografio), H. A. de Hoog (gramatiko), d-ro J. C. Wells (prononcado). Pri la konsisto de la Akademio ni povas diri jenon:

Inter la 45 membroj troviĝas nur du virinoj: d-rinoj Marjorie Boulton (Britio) kaj Clelia Conterno (Italio). Dek unu anglalingvanoj konsistigas la plej fortan nacilingvan grupon en la Akademio. Sekvas kvin franclingvanoj, kaj po tri reprezentantoj de jenaj lingvoj: germana, hispana, itala, japana kaj norvega. Du reprezentantoj de la kroatserba troviĝas en la Akademio. Po unu akademiano apartenas al ĉi tiuj gepatraj lingvoj: afrikansa, armena, bulgara, ĉeĥa, dana, finna, islanda, nederlanda, pola, portugala, rusa, sveda.

Prof. Gaston Waringhien prezidis la Akademion dum 16 jaroj, inter 1963 kaj 1979. Sekretariis en tiu periodo unue d-ro A. Albault (nur mallongan tempon) kaj poste s-ro Roger Bernard. Sub la gvido de prof. Waringhien la Akademio okupiĝis pri pluraj gravaj gramatikaĵoj: la Zamenhofa uzado de la pasivaj participoj, la reguloj de la Esperanta vortfarado, la ĝusta uzado de la refleksivo, la landnomaj finaĵoj -ujo kaj -io. Aperis ankaŭ la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro kaj Baza Radikaro Oficiala. Ĉio ĉi troviĝas en Aktoj de la Akademio I kaj Aktoj de la Akademio II.

La esperantologoj havas tre malsaman opinion pri tio, ĉu la Akademio dum la lastaj jardekoj entute funkciis aŭ funkciis kontentige.

En la nova statuto de UEA troviĝas la frazo „La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto".

I. a. la diskutoj dum la aranĝoj de la 2a Esperantologia Konferenco kaj en la Komitatkunsidoj dum la 64a Universala Kongreso de Esperanto 1979 en Lucerno montris, ke oni povas senfine disputi pri tio, kio estas (a) ĝenerala lingvouzo kaj (b) en kio konsistas la kontrolo de la Akademio.

Jen defio kaj programo por la Akademio kaj ĝia estonta laboro.

Werner Pfennig

Wochenendseminare

(Erfahrungen des Bezirksarbeitskreises Neubrandenburg)

1. Vorbemerkungen

Ein ständiger Schwerpunkt in der praktischen Arbeit an der Basis ist die ständige sprachliche Ausbildung der Esperanto-Freunde und die Erhöhung der sprachlichen Fähigkeiten und Fertigkeiten, beginnend beim Zirkel für Anfänger, über den Zirkel für Fortgeschrittene bis hin zum Konversationszirkel. Das Ziel muß sein, den größten Teil der Interessenten ohne die bekannten „Ermüdungserscheinungen" bis zur vollen Beherrschung des Esperanto zu führen.

Wie immer wieder festgestellt werden muß, fehlt es insbesondere an der praktischen Sprachausbildung der Autodidakten und Fernkursteilnehmer, die auch oft nach monatelangem Studium noch keine Gelegenheit zum Üben des korrekten Sprechens hatten.

Die verschiedenen bezirklichen, zentralen bzw. internationalen Veranstaltungen sind für die sprachlichen Ausbildungen sehr wichtig, doch setzen sie teilweise bereits die Kenntnis des Esperanto voraus. Bei den verschiedenen Seminaren des Zentralen Arbeitskreises ist wiederum das Hauptanliegen die politisch-ideologische und fachliche Aus- und Weiterbildung der Esperanto-Freunde und Leitungskader.

Andererseits ist für viele Interessenten eine Teilnahme an den zentralen Seminaren aus verschiedensten Gründen nicht immer möglich (Freistellung, Familie, Beruf u. a.).

Eine wertvolle Ergänzung in der Sprachausbildung bieten daher die 2-tägigen Intensivkurse bzw. Wochenendseminare, die von manchen Bezirken mit großem Erfolg organisiert werden. (z. B. außer in Neubrandenburg auch in den Bezirken Schwerin und Potsdam)

2. Inhalt und Ziel der Seminare

Die Wochenendseminare haben also das Ziel, in möglichst intensiver Form bereits vorhandene Kenntnisse erheblich aufzufrischen oder zu vertiefen, neue Sprachfertigkeiten zu vermitteln oder – wie es für viele Teilnehmer durchaus zutrifft – auch erstmalig die Sprache im mündlichen Gebrauch anwenden zu lernen. Außerdem sind viele Möglichkeiten des praktischen Erfahrungsaustausches gegeben. Die Anreise der Teilnehmer könnte bis Freitagabend erfolgen, so daß der Sonnabend und der Sonntagvormittag zur Verfügung stünde. In manchen Bezirken käme auf Grund der Entfernungen die Eröffnung erst am Sonnabend in Frage.

Wer könnte an solchen Seminaren teilnehmen?

Eine Möglichkeit wäre die Aufteilung der Teilnehmer entsprechend der sprachlichen Vorbildung in folgende Gruppen:

1) Anfänger
   – für Teilnehmer aus den Zirkeln für Anfänger, Fernkursen sowie Autodidakten

2) Fortgeschrittene
   - für Teilnehmer aus den Zirkeln für Fortgeschrittene, Fernkursen und für Autodidakten mit Spracherfahrung

3) Konversationsgruppe
   - für Teilnehmer mit Abschluß höherer Prüfungen (z. B. „B"), Fernkursanten und Autodidakten mit internationaler Spracherfahrung.

Abgestuft nach den sprachlichen Voraussetzungen könnten dann u. a. folgende Übungen durchgeführt werden:

- Lautes Lesen und Übersetzungsübungen
- verstehendes Lesen (Lesen von Esperanto-Themen und sinngemäße Wiedergabe in der Muttersprache)
- Situationsdialoge (im Kaufhaus, auf dem Bahnhof usw.)
- Wortbildungsübungen (auch in Form von interessanten Spielen)
- Kurzvorträge der Teilnehmer zu bestimmten Themen in Esperanto
- Bildbeschreibungen in Esperanto u. v. a. m.

Großen Wert sollte man bei allen Übungen auf den *Gebrauch der Sprache* durch alle Teilnehmer legen.

Dem Seminargruppenleiter obliegt die Aufgabe, das gesamte Lehrprogramm ohne jeden Leerlauf ständig interessant und abwechslungsreich zu gestalten und jeden einzelnen Teilnehmer zur aktiven Mitarbeit anzuregen.

Am Sonnabend könnten im Rahmen des Abendprogramms Kurzvorträge über die internationale Esperanto-Bewegung oder Unterhaltungsbeiträge (Spiele, Sketsche u. a.) geboten werden.

3. Technisch-organisatorische Voraussetzungen

Eine planmäßige und langfristige Vorbereitung ist für die Sicherung eines erfolgreichen Seminars unbedingt erforderlich. Abhängig von den örtlichen Gegebenheiten sind rechtzeitig, oft Monate vorher, folgende Probleme zu klären:

- Unterrichtsräume (und zwar für jede Seminargruppe) also mindestens 3 Räume
- Unterbringung der Teilnehmer (Hotel, Internate)
- Versorgung, Bestellung Mittagessen, Abendbrot
- Kursusleiter (für mindestens 7 – 10 Teilnehmer einen Zirkelleiter)
- Informationen und Werbung für das Seminar (Rückantwort rechtzeitig fordern, um die Präzisierung der Übernachtung, des Essens u. a. vornehmen zu können)

4. Finanzplanung

Die Einnahmen und Ausgaben der Wochenendseminare muß Gegenstand der Finanzplanung des BAK Esperanto sein (jeweils im Juni des Vorjahres).

Zu berücksichtigen sind als Ausgaben:

- Raummieten
- Versorgung, Unterbringung, Reisekosten und Honorar der Zirkelleiter
- Speisen, Unterbringung, Reisekosten der Teilnehmer

als Einnahmen:

- Teilnehmergebühren

5. Schlußfolgerungen

Regelmäßig durchgeführte Wochenendseminare zur esperanto-sprachlich-fachlichen Ausbildung der Teilnehmer sind in allen Bezirken der Republik notwendig, da mit relativ geringem Organisationsaufwand gute Ergebnisse erzielt werden können. Teilnehmer, die unter komplizierten Bedingungen Esperanto lernen (Fernkursanten, Autodidakten), können zeitsparend und effektiv ihr Studium durch solche Seminare beschleunigen. Nicht unwichtig ist der moralische Effekt der Seminare, sowohl für die Kursleiter, als auch für die Teilnehmer durch das Gemeinschaftserlebnis.

Als günstig hat sich erwiesen, daß sowohl Zirkelleiter aus dem befreundeten sozialistischen Ausland (z. B. für die Konversationsgruppen) als auch Zirkelleiter aus dem eigenen Bezirk, oder wenn nötig, aus anderen Bezirken gewonnen werden.

Solche Wochenendseminare sind insbesondere für die Bezirke und Kreise von großer Bedeutung, die nicht in der Lage sind, einen Kursusbetrieb abzusichern, weil zwar Interessenten und Fernkursteilnehmer existieren, aber keine Kursusleiter vorhanden sind.

Durch regelmäßige (etwa 2 mal im Jahr) durchgeführte Wochenendseminare ist man in der Lage, eine große Anzahl von Teilnehmern auszubilden

Resumo

Spertoj pri semajnfinaj intensaj kursoj por perfektigi la partoprenantojn laŭ lingvaj kapabloj.

Eĉ tio okazis

Bedaŭrinde

S-ino Sörensen el Malmö forkuris de sia novedzo jam la unuan tagon. La ne plu juna historiisto dum la nupta nokto nur laŭtlegis al ŝi pri geedziĝfestaj moroj en pasintaj jarcentoj.

Fera volo

Per longjara ekzercado la 30-jara meksikano Pablo Macias akiris la kapablon mirinde rapide kuri „kvarpiede". En konkurso kontraŭ kvin hundoj li gajnis la duan lokon. Nur unu, ĉashundo, estis pli rapida.

Krizaj momentoj

Parolanto de nederlanda radiostacio deklaris: „En la homa vivo ekzistas du krizaj momentoj: la neevitebla ŝanĝiĝo de la voĉo, en aĝo de 14 jaroj, kaj la evitebla ŝanĝo de la edzino, en aĝo de 40 jaroj."

Fulmrapide

La energia agado de pluraj maljunaj damoj malhelpis atakon je supermarkto en Vieno. Viro per pistolo minacis la kasistinojn, kiam la aĉetintinoj komencis ĵeti sur lin varojn el siaj korboj. Nur per rapida fuĝo la krimulo povis savi sin el la senĉesa bombado de pomoj, potoj kaj salamoj.

Linde Knöschke

Parolantaj ciferoj

Dum la 13a plenkunsido de Centra Laborrondo, la 12./13. decembro en Potsdam, Linde Knöschke prelegis pri la sociologia konsisto de la esperantistaro en GDR. Jen resumo de ŝia materialo

Partoprenintoj de la kvin ĝisnunaj centraj konferencoj de la esperantistoj de GDR grumblinte respondis multajn demandojn en sufiĉe ampleksaj aliĝ-folioj. Tiujn ŝvitproduktojn CLE ne forĵetis, sed analizis ilin por gajni informojn bezonatajn por pli efika gvidado, edukado, argumentado k.t.p.

La kolektitaj indikoj kaj ciferoj fariĝis interesa materialo, pri kiu ĉiu kunhelpinto rajtas esti informita.

Triono de nia membraro partoprenis en almenaŭ unu el la ĝisnunaj konferencoj, 1970 – 1978. La analizo montras, ke ne ĉiam la samaj honorindaj moŝtoj partoprenis, sed ke 60 % estas novaj nomoj, unuan fojon partoprenante konferencon.

La meza aĝo de niaj partoprenintoj estis kaj restis 45 jaroj. La plej multaj esperantistoj estas inter 30 kaj 60 jarojn aĝaj kaj laboras aktive en siaj profesioj. 20 % estas gejunuloj kaj 32 % estas pensiuloj.

Ne ĉiu kongresinto trovis „kongresedzinon“, ĉar 63 % el la partoprenintoj estis viroj kaj nur 37 % virinoj. Sed el la viroj 65 % estis edziĝintaj. Inter la virinoj kelkaj pli estis „haveblaj“, ĉar nur 42 % estis edziniĝintaj. Certe la troŝarĝeco de edzinoj/patrinoj ofte malhelpas la aktivan partoprenon en la Esperanto-movado. Aliflanke sole vivantaj inoj volonte uzas la eblecon de sociaj kontaktoj en grupoj kaj kluboj.

Rigardo je la profesioj de niaj membroj montras, ke granda parto (32 %) apartenas al la pedagogia, teknika kaj soci-scienca inteligentularo. Tio koincidas kun la ĉefaj celgrupoj de kulturliga agado. 10 % estas manlaboristoj kaj 10 % estas lernantoj/studantoj. Verŝajne la rilatoj estus aliaj se Kulturligo havus pli da grupoj ankau en uzinoj kaj lernejoj, kaj Kulturligo fakte strebas al pli senperaj kontaktoj kun tiuj medioj.

Inter niaj pensiuloj granda parto apartenis al la laborista E-movado. 56 % el ili estas membroj de la Sozialista Unuiĝinta Partio, do aktive partoprenas la politikan vivon de la ŝtato, por kies ekzisto ili june batalis. El ĉiuj konferencintoj preskaŭ 40 % estas membroj de la Socialista Unuiĝinta Partio kaj kvar aliaj partioj, kaj 70 % apartenas al la Societo por Germana-Soveta Amikeco. Ni do povas konstati, ke multaj Esperantistoj interesiĝas kaj agadas por sociaj kaj politikaj aferoj. Verdaj fantaziuloj kaj mondfuĝintoj jam estas esceptoj.

Pro historiaj kaŭzoj Esperanto estis malpermesata de 1933—1945 kaj nur 1965 en GDR fondiĝis Centra Laborrondo kiel estraro de la esperantistoj en Kulturligo de GDR. 25 % el niaj konferencintoj lernis E-on antaŭ 1933. 6 % lernis je privata bazo inter 1933 kaj 1965, kaj la plej granda parto, 69 %, lernis Esperanton post 1965, ĉefe en grupoj kaj grupoj de Kulturligo. Interesa observo estas, ke la meza aĝo de Esperanto-komencanto ĝis 1965

estis 20 jaroj, sed en Kulturligo 32 jaroj. Verŝajne la nuntempe pli longa fazo de ĝenerala edukádo (10-a klaso, profesi- lernado, soldatservo, rekta au koresponda studado) kaŭzas, ke oni nur malfrue trovás tempon por flegi ŝatokupojn.

42 % el la partoprenintoj eksciis pri E-o pere de parencoj aŭ konatuloj, kaj 22 % el la gazetaro. Aliaj fontoj (murkestoj, prelegoj, flugfolioj) tamen ne restis sen efiko.

La plej facila ebleco apliki Esperanton kaj perfektiĝi en ĝi estas la korespondado. Kvarono bedaŭrinde ne uzas tiun eblecon. La ceteraj korespondas ĉefe kun Sovetunio (24 %) kaj aliaj socialismaj landoj (aliaj 50 %). El la nesocialismaj landoj Japanio okupas la unuan rangon (5 %). Ĉiu esperantisto korespondas kun meze ok leteramikoj.

Ĉu niaj membroj estas poliglotoj? Kvarono indikis, ke ili regas neniun lingvon krom Esperanto. 60 % havas lernej-nivelajn konojn de la rusa kaj la angla. 22 % lernis la francan. Kvar lingvojn kaj pli krom E-o konas 9 % el la demanditoj.

La analizo montris, ke 12 % ne legas E-gazeton. Hontinda kaj bedaŭrinda afero, ĉar la E-gazetaro estas nia plej grava informfonto pri la en- kaj eksterlanda movado. Sed la plej multaj tamen legas almenaŭ „der esperantist“ kaj „PACO“. Kelkaj legoaktivuloj (6.5 %) legas ses kaj pli gazetojn.

Karaj pacience finlegintoj, mi pensas, ke la analizo de niaj aliĝiloj respegulas interesan bildon de nia situacio. Ni dankas al ĉiuj, kiuj per zorgemaj respondoj kontribuis al nia laboro kaj esperas, ke nin atingos proponoj por pluraj interesaj demandoj kaj ke ankaŭ la partoprenontoj de estontaj konferencoj pretos kunhelpi la aktualigadon de la rezultoj.

Linde Knöschke

Antaŭ 10 jaroj mortis E. A. Bokarev
Ni memorigas:

20. 3. 1904 Evgenij Alekseevič **Bokarev** (- 1971) naskiĝis. Multflanka soveta sciencisto, klera lingvisto kaj unu el la plej profundaj teoriuloj de la Esperanto-movado. Lernis Esperanton en 1918, organizis la unuajn Esperanto rondetojn en Rostov kaj gvidis kursojn. Delegito de la 2. kaj 3. kongresoj de SEU (1925 kaj 1926), membro de la Centra Komitato de SEU. En 1963 li laboris pri la fondo de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj ĉe Unio de Societoj de Amikeco kun Eksterlandoj kaj fariĝis ties prezidanto. Samjare li elektiĝis membro de la Akademio de Esperanto. El lia plumo fontis la „Rusa-Esperanta Vortaro“ (Moskva, 1966) kaj „Esperanta-Rusa Vortaro“ (Moskva, 1974). Granda verko „Fundamentoj de Interlingvistiko“ restis nefinita.

Komuna Esperanto-Informilo
spec. n-ro 1/1978

Hilda Drezen 11. 5. 1896—5. 2. 1981

Forpasis eminenta poetino de la Esperanta literaturo. Hilda Drezen verkis originale kaj tradukis multajn literaturajn valorajĵojn el la estona lingvo. Petro Polišĉuk el Taŝkento dediĉis al ŝi jenan poemon:

Silentu esperantistaro! ...
Sur koron falis ŝtono peza! ...
De ni forpasis, nia kara,
Geniulino, Hilda Dresen! ...

Dum longaj jaroj, Hilda agis
Utile al la lingvo verda ...
Neniu pensis kaj imagis,
Ke povis esti tia perdo!

Nek aŭdos plu mi ŝian voĉon,
Nek novajn, brilajn verkojn legos!
...

Funebra pens' en kor' diboĉas,
Funebro mian koron regas! ...

Talenta, saĝa, klera, sprita! ...
Unikis laboremo ŝia! ...
Al senkompata morto, spite,
Ŝi vivas en animo mia!

Ni super ŝia tomb' ne ploru,
Nek verŝu larmojn, nur memoru,
Ke ŝi donacis malavare,
Al monda esperantistaro,
La perlojn de talento ŝia! ...
Senlimas nun funebro mia! ...

Silentu esperantistaro! ...
Sur koron falis ŝtono peza! ...
Forpasis poetino kara,
Geniulino, Hilda Dresen! ! !

Petro Polišĉuk, Taŝkento, USSR

Arpád Abonyi: La filmo kaj Esperanto

La filmarto ne havas tiel gravan rolon en la E-movado kiel la teatro. Ĝi estas pli multekosta arto, kaj ĝis nun ne naskiĝis signifaj E-o parolantaj filmoj. La unua tia filmo estis prezentita en 1911, dum la Antwerpen-a Universala Kongreso. Ĝis la 1980a jaro naskiĝis plie kurtaj filmoj, kaj tiam alvenis la unua florepoko de la produktado de E-aj filmoj. Du faktoj estas notindaj: La aktivado de Jean Forge en Germanio, kaj la produktajĵoj de la usona filmfabriko Paramount, kiun sekvis la famega Metro-Goldwyn-Meyer. Kvar, parte E-e parolantaj filmoj naskiĝis tiutempe: Idiot's Delight (reĝisoro Clarence Brown, ĉefrolantoj: Norma Shaerer kaj Clark Gable), Virino de l'tropiko (kun Heddy Lemarr kaj Robert Taylor). La vojo ĝis Singapur (kun Dorothy Lamour kaj Bing Crosby) kaj Konspiro. La praktiko de l'sinkronigo de la filmoj iom malhelpis kaj malhelpas la aferon de la Esperante parolanta filmo.

(Budapeŝta Informilo 6/80)

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (9)

El nia ĉefurbo

Preskaŭ pri ĉiu pli granda urbo aŭ regiono ekzistas legendoj, kiujn oni transdonas de unu generacio al alia. Ankaŭ pri nia ĉefurbo Berlin ekzistas multaj. Hodiaŭ ni volas prezenti al vi du. Eble dum via vizito en Berlin vi povas viziti la lokojn, pri kiuj en ili temas.

La Virgulinponto

En strateto ĉe la rivero Sprevo, apud ponto loĝis maljuna, blinda viro. Ĉar li ne bezonis multe da dormo, li ofte sidis ĉe malfermita fenestro kaj aŭskultis la silenton de la nokto. Sed foje en la nokto li aŭdis voĉojn: raŭkan, kvereleman de iu viro kaj petegan de iu minacata knabino. „Do, iru al infero!", aŭdis diri la blinda maljunulo. Poste li ekaŭdis krion, plaŭdon en la akvo kaj rapide sin malproksimiĝantajn paŝojn.

Dum la venonta mateno oni trovis la knabinon en la rivero kaj eltiris ŝin. Akuzita, arestita kaj juĝita estis la fianĉo de la knabino. Sed la blindulo lasis sin gvidi al la juĝejo kaj laŭ la raŭka voĉo li rekonis la murdiston de la knabino. Tiu ne estis ŝia fianĉo, sed la viro, kiu misakuzis lin.

La leonoj sur la Paroĥa preĝejo

En la turo de la Paroĥa preĝejo estis belsona sonorilaro. Ĝi eksonis en ĉiu horo kaj la kvar bronzaj leonoj, sidantaj sur la anguloj de la turo akompanis ĝin per blekegado. Ĉar la urbestroj ne volis, ke ekzistu ankoraŭ dua tia artaĵo en la mondo, ili igis al la majstro, kiu ĝin faris, elpiki ambaŭ okulojn. La majstro petis, ke oni ankoraŭfoje kondutu lin en la turon. Kiam li estis supre ĉe lá sonoriloj, li turnis iun ŝraŭbon kaj la sonorilaro malfunkciiĝis. De tiu tempo ankaŭ la leonoj estas mutaj.

Klarigoj

legendo	— Legende, Sage;
virgulinponto	— Jungfernbrücke (virgulino = Jungfrau);
blinda	— blind;
malfermi	— öffnen;
raŭka	— rauh, heiser;
petegi	— flehen (pet-eg-i);
infero	— Hölle;
plaŭdo	— Plätschern;
malproksimiĝi	— sich entfernen (mal-proksim-iĝ-i);
eltiri	— herausziehen (el + tiri);
juĝejo	— Gericht(sgebäude);
misakuzi	— fälschlich beschuldigen;
leono	— Löwe
paroĥo	— Pfarre;
belsona	— schönklingend (bela - sono);
sonorilaro	— Glockenspiel (sonor-il-ar-o);
eksoni	— ertönen (ek-soni);
bronzo	— Bronze;
blekegi	— brüllen (Tiere);
artaĵo	— Kunstwerk (art-aĵ-o);
majstro	— Meister;
ŝraŭbo	— Schraube;
malfunkciiĝi	— aufhören zu funktionieren (mal-funkci-iĝ-i);
muta	— stumm

Rilatu al Krasnodar!

Krasnodaraj esperantistoj aktive komencis la novan lernojaron. Komence de septembro 400 afiŝoj kun invitoj al E-ekspozicioj, E-kursoj ornamis la urbon. En septembro-oktobro estis aranĝitaj du grandaj ekspozicioj „Esperanto servas al paco“, 3 koncertoj, 7 prelegoj pri Esperanto, en kiuj partoprenis ĉ. 500 personoj. Al la E-kursoj aliĝis 200 urbanoj. En Krasnodar funkcias 10 kursoj de Esperanto por komencantoj en la E-klubo, en la palaco de pioniroj, en la teritoria Domo de laboristoj pri klereco, en la teritoria biblioteko, en la mekanika teknikumo, en la agrikultura instituto, en la ŝtata universitato. En la universitato Esperanto estas akceptita kiel oficiala studobjekto en la fakultato pri sociaj profesioj. Post du jaroj de studo studentoj ricevas diplomon kun la rajto instrui Esperanton. Funkcias tri studgrupoj. En 1981 krasnodaraj esperantistoj organizas ekspozicion de la politika plakato de GDR. Ni petas la germanajn esperantistojn sendi materialojn por tiuĉi ekspozicio. Ĉiuj sendintoj estos rekompencitaj per memorindaj donacoj. Ĉiuj dezirantoj kontaktu kun krasnodaraj esperantistoj. Skribu amase laŭ adreso: Esperanto-organizaĵo, p. k. 18, SU-350 000 Krasnodar.

Alvoko el Litovio

Omaĝe al Tutmonda tago de junularo la Esperanto-Klubo „Horizonto“ en Jurbarkas aranĝos grandan ekspozicion sub titolo „Junularo de la mondo en batalo por la paco kaj solidareco“.

Ni tre petas ĉiujn esperantistojn, ĉar ni konsideras, ke la mondpaco estas la afero de ĉiuj kaj de ĉiu, fari ĉion eblan por sukceso de ekspozicio. Bonvolu sendi al ni konvenajn materialojn: afiŝojn, bildojn, fotojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn en ĉiuj lingvoj. Ni esperas je aktiva reeĥo de multaj E-kluboj kaj unuopaj gejunuloj. Al ĉiu kontribuinto ni sendos litovan memoraĵon aŭ rekompencos laŭdezire. Ĉion adresu al: Abromas Laimundas, SU-234 432 pŝt. Pilis, Jurbarko raj. Litovia-USSR.

La supre menciita adreso validas por korespondado. Ĉiu, kiu volas ligi korespondan kontakton kun litovaj esperantistoj, skribu al peranto laŭ supre menciita adreso, indikante pri si donitaĵojn.

Sukcesa diplomiĝo

Če la Pjatigorska instituto de fremdaj lingvoj, A. S. Melnikov el Rostov-Don (Sovetunio) defendis sukcese diplomlaboraĵon, en kiu li prezentis la agadon de la kluboj de internacia amikeco kaj la praktikan agadon de la Rostova Esperanto-Klubo.

Diskoklubo „Esperanto“

La novfondita diskoklubo „Esperanto“ ĉe la Samarkanda urba komitato de komsomolo turnas sin al ĉiuj Esperantogrupoj kaj apartaj personoj, kiuj povas peri amikajn kontaktojn kaj kunlaboron kun similaj junularaj diskokluboj alilande aŭ helpi per spertinterŝanĝo, konsiloj, programoj de diskovesperoj, revuoj, fotoj, afiŝoj, lumbildoj, sondiskoj k. t. p.

La estraro de la diskoklubo garantias laŭdeziran rekompencon al ĉiu helpanto (albumoj, lumbildoj, sondiskoj, libroj, bildkartoj, memoraĵoj k. t. p.).
Oni korespondas en diversaj lingvoj (Esperanto, la rusa, angla, germana, franca k. a.)!

Bv. adresi ĉion al: Samarkandskij gorkom LKSM Uzbekistana Diskoklub „Esperanto“, SU-703 000 Samarkando, ul. Vojkova 3, Uzbekistano, USSR

Recenzoj pri „Problemy interlingvistiki“

En „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“ 2/1981 (Berlin, GDR) aperis recenzo de Detlev Blanke pri la soveta verko „Problemy interlingvistiki“ (Moskva 1976).

Pri la sama verko recenzis docento d-ro Otto Troebis de la universitato Halle en „Wissenschaftliche Zeitschrift der Universität Halle“, Gesellschaftswiss. Reihe, vol. XXIX 1980, n-ro 4, p. 117—118.

Dankon pro gratuloj

Ne povante respondi al ĉiuj, kiuj estis tiel afablaj gratuli al mi okaze de mia 80a naskiĝtago, mi ĉi-voje volas tre kore danki pro la granda ĝojo farita al mi.

S. N. Podkaminer

Distingo de SSOD

Okaze de lia 80a naskiĝtago la Societo de Asocioj por amikeco kaj kultura interŝanĝo kun eksterlando distingis prof. S. N. Podkaminer per la „Ora Insigno“.

Informoj el GDR

14a plenkunsido de CLE

La 27an kaj 28an de marto 1981 en Halle okazis la 14a plenkunsido de CLE. La membroj informiĝis pri aktualaj problemoj de la internacia politika situacio (H. Heinel), resumis la rezultojn de la elektokonferencoj de la Distriktaj Laborrondoj (H. Hahlbohm), traktis la ĉefajn problemojn de la fondota Esperanto-Asocio kaj ties novajn gvidliniojn (D. Blanke) kaj debatis pri la plibonigo de la gazetinforma laboro (W. Pfennig). Oni krome aŭskultis multajn raportojn pri Esperanto-aranĝoj eksterlande kaj en GDR.

Festkunsido en Gotha

La 29an de marto 1981 la esperantistoj de la distrikto Erfurt festis per solena aranĝo en Gotha la 10jaran ekziston de Distrikta Laborrondo Esperanto. Partoprenis la aranĝon 30 delegitoj el la subdistriktoj, inter ili la 1a sekretario de la Distrikta Estraro de Kulturligo, d-ro Kurt Ludwig, la 1a sekretario de la subdistrikta Estraro de Kulturligo el Gotha, s-ro Weisheit kaj de CLE d-ro Blanke. En ampleksa referaĵo la honora prezidanto de DLE Erfurt, Werner Habicht, resumis la 10jaran agadon, kiu firme baziĝas sur la tradicioj de la Laborista Esperanto-movado, kiu havis fortajn radikojn en la regiono Erfurt-Weimar. Sekvis pluaj raportoj kaj prelego de d-ro Blanke pri la agado de la esperantistoj en GDR dum la 80aj jaroj, kiu vekis viglan diskuton.

Aparte atentinda estas, kiel montriĝis en la raporto, la aktiveco de la grupo en la vilaĝo Dienstedt, kie 5 % de ĉiuj loĝantoj (= 650) eklernis Esperanton.

La Apelacio de Sofio poŝtkarte

Originalan ideon havis Jürgen Hamann, kiu promesis dum kunsido de la Pac-konsilantaro de GDR (10. 10. 1980), ke ankaŭ la esperantistoj kontribuos al la popularigo de la Apelacio el Sofio.

En eldonkvanto de 5000 ekzempleroj li presigis la Apelacion en formato de poŝtkarto, kiu estas sendita al multaj esperantistoj tra la mondo. (kp. „der esperantist" 104 [6/80], p. 131)

Solidarec-aŭkcio

En aŭkcio por solidareco kun popoloj batalantaj por sia libereco la esperantistoj de Neubrandenburg kolektis 78 markojn.

„Militaria"

Tiel nomiĝis ekspozicio, komune aranĝita (omaĝe al la 25a datreveno de la fondiĝo de la Popola Armeo de GDR) de filatelistoj, numismatikistoj kaj la amikoj de stanfiguroj, kiu okazis de 30. 1. gis 8. 2. 1981 en la ekspoziciaj haloj de la televida turo en Berlin. Vizitis ĝin pli ol 15 000 homoj. En la ekspoziciejo ankaŭ troviĝis granda vitrino kun Esperantaj materialoj. Krome, en la katalogon de la ekspozicio eniris 2-paĝa kontribuo de Detlev Blanke („Kontraŭ militarismo kaj milito, por paco kaj malstreĉiĝo. Revoluciaj tradicioj de la esperantistoj") kaj du tutpaĝaj reproduktoj de materialoj el la historio de la Laborista Esperanto-movado (paĝo de „Völkerspiegel" kaj de „Arbeiter-Esperantist").

Teknikistoj teknologoj, konstrukciistoj

Laborkolektivo el Karl-Marx-Stadt/GDR, kiu konsistas el 15 gekonstruistoj kaj desegnistinoj, serĉas leteran kontakton kun samfaka aŭ alisimila laborkolektivo en socialisma lando por korespondi pri ĉiutaga vivo, socialista vivmaniero, laboro, amuzado, ĉiutagaj problemoj kaj problemetoj.

Ni konstruas ilojn kaj porproduktajn helpaparatojn en fabriko por trikmaŝinoj kaj bicikloj.

Koresponda lingvo povas esti kaj germana kaj Esperanto. Esperanto estas preferata, ĉar la bona celo de la korespondado subtenus poresperantan propadandon.

En kazo de intereso kontaktiĝu kun: Wilfried Hofmann, Kopernikusstraße 60, DDR-9030 Karl-Marx-Stadt.

Ni kore gratulas

— al Alfred Nier, kiu festis la 1an de junio 1981 sian 80an naskiĝtagon.

Honorinsigno de CLE

La Honorinsignon de CLE ricevis lastatempe

Magnus Weisflog, Scheibenberg; Otto Möller, Heiligenstadt; Harald Micheel, Erfurt; Rudolf Masek, Neudietendorf.

Dum la IIIa Centra Konferenco en Karl-Marx-Stadt ni donis ĝin al

Maria Jenzen, Stralsund; Linde Knöschke, Berlin; Michael Lennartz, Ludwigsfelde; Siegfried Linke, Halle; Walter Kemnitz, Halle.

Ni kore gratulas.

IFER '81 en Leipzig

95 esperantistoj el 4 landoj renkontiĝis de la 13a ĝis 15a de marto 1981 sub la temo „Frataj landoj — Partneraj urboj — Bonaj geamikoj". Honoraj gastoj estis la trikapa delegacio de Distrikta Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio Plovdiv, sub la gvido de ties prezidanto, Jordan Angelov, la sekretario de ČEA, Zdeněk Křimsky, kaj la sekretario de CLR en Kulturligo de GDR, d-ro Detlev Blanke. La renkontiĝo komenciĝis vendrede per agrabla interkonatiĝa vespero. Sabaton antaŭtagmeze, parto de partoprenantaro konatiĝis kun la vidindaĵoj kaj sciindaĵoj de Leipzig. Posttagmeze la interesiĝantoj travivis ĉiĉeronadon en Thomas-preĝejo kaj aŭskultis motetan koncerton de la koruso Thomanerchor. Dum la granda vesperaranĝo la organizintoj atentigis pri diversaj spertoj en la amikaj rilatoj inter esperantistoj el partneraj urboj kaj pri la kultura riĉeco de la popoloj, travivebla ankaŭ per la flegado de partneraj rilatoj. La unua programero estis prezento de latinamerikaj popolkantoj far grupeto de gestudentoj el la ensemblo „Solidarität" de Karl-Marx-Universitato. Sekvis kelkaj vortoj de Michael Behr, prezidanto de Leipzig-a DLR, pri la tre ĝojigaj spertoj en la partnereco kun la esperantistoj el Plovdiv (de kie ja ĉeestis delegacio dum ses tagoj en Leipzig), kaj pri la planoj al partneraj rilatoj inter Leipzig/Kiev kaj Leipzig/Brno.

S-ino Hanna Scheffs, prezidantino de Potsdama DLR, raportis pri la spertoj de la esperantistoj el Potsdam rilate al la paŝoj por starigi amikajn kontraktojn pri kunlaboro. Kiel ekzemplo por parteto de kultura riĉeco de la germana popolo, Jürgen Hamann recitis kelkajn poemetojn de Heinrich Heine. La prezentadoj de la ensemblo por kantoj kaj dancoj „Javornik" el Brno estis la plej bona ebleco por montri la kulturajn valoraĵojn, kiun ni ekkonas dum la amikaj kontaktoj kun aliaj popoloj. Admirinde estis, kiel rapide la artistoj enportis la folkloran kaj entuziasmigan atmosferon en la salonon. La publiko dankis per longdaŭra aplaŭdo. Alian nuancon montris du paroj de turniraj dancantoj, prezentantaj latinamerikajn dancojn kaj dancojn el la komenco de nia jarcento. Tio vere instigis kelkajn partoprenintojn al danco dum la dua parto de la vespero, destinita por gajaj interparoloj kaj dancado.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis paralelaj seminarioj. En la seminario de d-ro Krause oni aŭskultis interesajn ekzemplojn de problemoj dum ellaborado de vortaro kaj diskutis pri diversaj flankoj de la tradukado. La poŝtista fakkunveno atingis kvazaŭ historian signifon, ĉar en ĝi fondiĝis la tutrespublika fakgrupo PTT (Poŝto, Telefono, Telegrafo), ligita kun CLE, sub la gvido de s-ro Horst Isensee. Samtempe kelkaj gejunuloj kunvenis kaj traktis siajn problemojn.

Kvankam la membroj de la Organiza Komitato de IFER '81 antaŭ kaj dum la aranĝo devis solvi sufiĉe komplikajn problemojn, ili tamen estas gajaj pri la minimume parta sukceso de la renkontiĝo. Ili dankas al ĉiuj kunhelpantoj kaj promesas lerni el tiuj spertoj. Kaj ili eĉ jam nun kuraĝas varbi Vin por IFER '82, kiu okazos ekde la 12a ĝis 14a de marto 1982 en Leipzig. Por ĉirkaŭ la samaj prezoj (ĉ. 60 m. por partopreno kaj manĝaĵoj, kaj ĉ. 50 m. por 2 tranoktoj, do 110 markoj), pli riĉa programo sub la ĉeftemo „Goethe kaj Faust en Leipzig" atendos Vin: Interkonatiĝa vespero, vizito de specialaj kulturaj monumentoj, seminarioj pri la ĉeftemoj, amuza vespero kaj sciencaj seminarioj. La Organiza Komitato ĝojas pri Viaj antaŭanoncoj, kiujn vi sendu al: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato IFER, DDR-7010 Leipzig, Pf. 713.

Milbe

Recenzo

Terminaro de pelt-industriaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro, oklingva, inkluzive Esperanton, estis eldonita de la Ŝtata Ofico por Normigo kaj Mezuroj, Praha, 1980, 21 × 15, 51 p., kun tripaĝa Esperanta aboca registro, prezo KČs 13,50, kiel ĉeĥoslovaka fakbranĉa normo (oborová norma ĉ. 79 8001). Sed la citita titolo estas indikita unuapaĝe, sole en la lingvoj ĉeĥa, rusa, Esperanta kaj angla. Aĉetebla en regionaj vendejoj de teĥnikaj normoj. Disdonita al ĉeestantoj de la Seminario pri apliko de E. en la scienco kaj teĥnikio en Usti n. L. Aŭtoro de la E.-versio estas Lubomir Středa, estro de normiga fako en Kara, n. p. La terminaro, konsultita ĉe membroj de STS de ČEA, evidente taŭge redonas la signifon de la originalo. Du specimenoj: připevňovací pistole visaček — fikspistolo de pendŝildetoj; mizdřici stroj (fleshingmacine, Entfleischmaschine) — maŝino por forigado de subhaŭta konektivo. (Eble sufiĉus „forigo".) — La eldono estas plua pruvo pri sukcesa aktiveco de la STS-anoj.

Sciencaj akticecoj

Sciencteknika Fakgrupo ĉe CLE

Pri la graveco de la apliko de Esperanto por scienc-teknikaj celoj ne povas esti dubo. Ankaŭ ne sufiĉas nur paroli pri tio. Ankaŭ tion jam longe konscias CLE vidante la modelan ĉi-rilatan agadon precipe en Hungario kaj ČSSR. Finfine, la 10an de januaro 1981 kolektiĝis en Berlin 15 personoj kiuj pretas agi iom pli konkrete sur tiu tereno. Oni povas diri, ke fondiĝis la Scienc-teknika Fakgrupo de CLE. Dum la duontaga kunveno (11a ĝis 16a horo) oni aŭskultis superrigardajn informojn pri la apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, konatiĝis kun la tre sukcesa SAEST (vidu „der esperantist" 6/1980) kaj interkonsiliĝis pri eventuala partopreno en la tria tiaspeca aranĝo okazonta de 15a ĝis 18a de aŭgusto 1981 en Žilina/ČSSR.

Oni eldonas, provizore germanlingvan, informilon de la fakgrupo, havos pluan kunsidon dum la IIIa Centra Konferenco majofine en Karl-Marx-Stadt kaj apartan kunvenon la 18an de septembro 1981 en Berlin.

Oni elektis kiel plej ĉefajn taskojn:

— preparado de kontribuoj por la seminario en Žilina
— stimulo de faka tradukado sur centra kaj distrikta niveloj
— partopreno en la tradukservo de HEA
— konstruo de faka kartaro de la esperantistoj de GDR por havi superrigardon pri la fake engaĝitaj esperantistoj de GDR
— ellaboro de fakaj terminaroj, resp. partopreno en tiaspecaj internaciaj laboroj.

Por la kunveno dum septembro oni traktos jenajn punktojn:

1. rezultoj de la seminario de Žilina
2. problemoj kaj spertoj ĉe la ellaborado de vortaroj (enkonduko)
3. perspektiva plano de la fakgrupo
4. gvidproblemoj.

Ĉiuj scienc-teknike interesitaj kaj kapablaj (gravas antaŭ ĉio la aktiva kunlaboremo) esperantistoj de GDR, kiuj pretas kunlabori en la fakgrupo senprokraste skribu al CLE.

Scienca diskuto

„La estonteco de la lingvo — la lingvo de la estonteco." Tiel nomiĝis diskutronda temo, kiun traktis profesoro d-ro Wotjak de Karl-Marx-Universitato Leipzig, s-ro Behr, la ĉefredaktoro de la Duden-redakcio kaj d-ro Detlev Blanke la 30an de oktobro 1980 en Klubo de la inteligentularo Gottfried Wilhelm Leibnitz en Leipzig.

Prelegoj antaŭ lingvistoj de Halle

La sekcioj lingvoscienco kaj literaturscienco de la universitato Halle organizis en la Domo de la Sciencistoj, la 26. 3. 1981, prelegon, kiun faris d-ro Detlev Blanke pri la temo: „Kio estas, kio estu interlingvistiko". Aŭskultis kaj tre serioze kaj interesite debatis 20 sciencistoj de la universitato.

Tiun prelegon iniciatis sciencistoj kiuj partoprenis la 2an interlingvistikan seminarion 1980 en Ahrenshoop.

La duan fojon en la Akademio

Jam dum septembro 1979 d-ro Detlev Blanke havis la eblecon prelegi pri la lingvistika valoro de planlingvoj antaŭ la prezidio de la Scienca Konsilantaro por Lingvistiko ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR. Duan fojon, la 20an de marto 1981, tiu alta instanco invitis lin por trakti pri la estonta scienca esploro pri Esperanto en GDR. Bazo de la diskuto estis ampleksa materialo ellaborita de prof. G. Meier kaj d-ro D. Blanke.

Ĝuĝev en „Scienca Mondo" kaj „Wissenschaftliche Welt"

En n-ro 4/79 de la esperantlingva revuo „Scienca Mondo", organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, aperis sur paĝoj 21 — 25 ampleksa studo de prof. Stojan Ĝuĝev, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj emerita profesoro de la universitato de Sofio sub la temo „Lingvaj konfliktoj kaj diskriminacioj en la internaciaj rilatoj". Tiun temon prof. Ĝuĝev traktis en la kadro de la 9a Mondkongreso pri sociologio/serio sociolingvistiko, kiu okazis de la 14a ĝis 19a de aŭgusto 1978 en Uppsala. Precize post unu jaro la artikolon ankaŭ transprenis la germanlingva serio de la menciita revuo „Wissenschaftliche Welt", 4/80, kiu estas redaktita en Berlin. La artikolo novtitoliĝis „Lingvaj konfliktoj kaj internaciaj rilatoj", p. 13 — 17, kaj estas iom mallongigita.

RECENZO

Aŭtora kolektivo:

PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO,

Oxford University Press 1979, 96 p.

La esperantistaro tra la tuta mondo tutcerte bonvenigos ci tiun novan publicaĵon sur la libromerkato. „Praktika Bildvortaro de Esperanto" estas esperantlingva versio de anglalingva bildvortaro destinita al la instruado de tiu lingvo al ne-anglalingvanoj. Kvankam la bildoj en la libreto certagrade montras scenojn el la vivo en Britio, tamen grandparte ili estas pli-malpli internaciaj kaj pro tio la libro povos facile esti uzata kie ajn, ĉu en eŭropa lando, ĉu en alia kontinento. Gia praktika valoro estas eksterduba kaj por la komencanto — por tiu ĉi speciale — kaj por la progresinta esperantisto.

La verkintoj de tiu ĉi esperantlingva eldono strikte uzadis la terminologion de „Plena Ilustrita Vortaro" kaj nur manpleno da vortoj ne jam registritaj en PIV troveblas. Sur paĝo 85 de la bildvortaro tiuj ĉi neologismoj estas listigitaj kaj la respektivaj fontoj, el kiuj la aŭtoroj ĉerpis, estas skrupule indikitaj. Sole tio ĉi atestas pri la ekzakta, scienca maniero laŭ kiu la kompilintoj de „Praktika Bildvortaro de Esperanto" verkadis.

La rezulto de ilia terminologia laboro estas konvinka kaj oni nur povas tutakore gratuli al ili kaj deziri, ke ilia ellaborajo estu ĉie en la esperantista medio tiel bonvole akceptata kiel de la recenzanto.

Por iom detalumi: La entute bone ilustrita libro enhavas, laŭ kompleksoj de situacioj aŭ de objektogrupoj, preskaŭ la tutan kalejdoskopon de la ĉiutaga vivo. Oni trovas ekzemple la temojn „La homa korpo", „Stratsceno", „En poŝtoficejo", „Flughaveno", „Sportoj", „Satokupoj", por nur nomi kelkajn el 35 temokompleksoj. Krome aldoniĝas (sur paĝoj 64 ĝis 84) utilaj tabeloj pri verboj, kvantaj kaj kolektivaj vortoj, pri adjektivoj, prepozicioj, korelativoj, numeraloj kaj mezuroj. Oni ne forgesis ankaŭ aldoni la literuman alfabeton por Esperanto, oni donas la esperantlingvajn ekvivalentojn de kelkaj landoj, ĉefurboj kaj valutoj, ne nur eŭropaj (p. 83) kaj finfine listiĝas kelkaj el la pli konataj esperantaj proverboj kaj parolturnoj. Tiujn ĉi lastajn oni devis vole-nevole limigi laŭnombre, ĉar internaciismoj en tiu ĉi lingva tereno ja maloftas. Proverboj ekzemple de la tipo „Kiam kato promenas, musoj festenas" estas kie ajn en la mondo esperantista komprenebla, sed mi iom dubas, ĉu tiaj de la tipo „La afero ne brulas" estas kompreneblaj por ne-eŭropano, kiu tutcerte miskomprenos, des pli ĉar multe pli taŭge estus esperantigi la laste menciitan parolturnon per „La afero (tute) ne urĝas". Oni povus do konkludi, ke la parto „Proverboj/Parolturnoj" povus sekvontaeldone forfali.

La uzonto de la „Praktika Bildvortaro de Esperanto" kun kontentiĝo trovos vortojn en la libreto, kiujn li vane serĉis en la dulingvaj vortaroj ĝis nun ekzistantaj. Mi nur menciu kelkajn: **borplatformo** (Bohrinsel), **primuso** (Spirituskocher), **glacoviŝilo** (Scheibenwischer [des Autos]), **spektoterasoj** (Zuschauertribüne) kaj multaj aliaj vortoj de tiu speco.

Oni devos certe atendadi ĝis la memkribra kaj mem-sindecida procedo de la lingvo (ĉiukaze: kiu ajn lingvo submetiĝas al tia procedo, ne nur Esperanto) akceptos aŭ denove elĵetos la jenajn vortojn, kiujn la aŭtoroj proponis: **kardigano** apud **trikita jako** (Strickjacke), **hoverkrafto** apud **ŝvebŝipo** (Schwebeschiff, Luftkissenfahrzeug). Por la lasta oni do, prefere, uzu **aerkusena veturilo** (aŭ **ŝipo**).

Interesaj estas la proponoj jenaj: **T-ĉemizo** (T-Shirt), **aviošipo** (Flugzeugträger) anstataŭ la iom pezeca **aviadilporta ŝipo** ie-tie uzata, **preterpasa koridoro** (Überholspur [auf Autobahnen]) kaj **lantmova koridoro** (Kriechspur).

Fine estu dirate, ke la preso estas pura kaj klara kaj ke preseraroj ŝajne tute ne ekzistas.

Resume: Pli da tiuspecaj aŭtoroj, pli da tiuj leksikografiaj verkoj!

D-ro Erich Dieter Krause

Libro pri sociaj organizoj

Fine de 1980 aperis en Staatsverlag der DDR, Berlin, libro kun la titolo „Die gesellschaftlichen Organisationen in der DDR: Stellung, Wirkungseinrichtungen und Zusammenarbeit mit dem sozialistischen Staat". Ĝin verkis aŭtora kolektivo. Sur paĝoj 63—66 oni trovas ĉapitron pri Kulturligo de GDR: „Kulturligo — la plej grava socia kulturorganizaĵo". En la ĉapitro estas menciitaj plurloke ankaŭ la esperantistoj.

Doktora titolo al Benczik

La 21an de novembro 1980 ĉe Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd", Vilmos Benczik, redaktoro de HV, komitatano de UEA, sukcese defendis sian doktoriĝan disertacion kun titolo „Sinteza legado de fremdlingvaj beletraj tekstoj". Li eminente ekzamenis pri metodiko de instruado de fremdaj lingvoj, ĝenerala lingvistiko kaj politika ekonomio.

Sincerajn gratulojn sendas kaj deziras novajn sukcesojn al d-ro Benczik. CLE

Lejzerowicz, I.:
„EL LA VERDA BIBLIO".
Reeldon. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest (1978), 81 p.

„En ĉiuj tempoj viaj vestoj estu verdaj kaj verda oleo ne manku en viaj kapoj!"
HEA ofertas frandaĵon por ŝatantoj de verda satiro. Izrael Lejzerowicz (1901 ĝis 1944) estis fervora esperantisto kaj brila publicisto, kiu pereis en Treblinka. Li verkis precipe por „Pola Esperantisto", „Heroldo" kaj „Literatura Mondo". 1935 aperis dudek kvin ĉapitroj „El la verda biblio". Per lingvo de la Sankta Libro li raportas amuze pri la historio de nia movado.

1. „En la komenco la Senkorpa Mistero kreis Volapükon. Kaj Volapük estis senforma kaj kaosa . . .". 24. „Kaj la Spirito kreis la neologismojn kaj ĉiujn malfacilajn vortojn, laŭ ilia speco, por eterna turmento de la novaj verduloj...". Ne mankas aludoj je eminentuloj de la movado kiel Bofrunt (Beaufront), Diofilo Kara (Théophile Cart), Andreo Apud (A. Cseh), Junio Pagi (Julio Baghy) aŭ Kalsurmano Galoŝej (K. Kalocsay). Klare li prezentas fenomenojn, kiuj kontribuis „nur por malvenkigi Esperanton".

En antaŭvorto la aŭtoro mem avertas la eternajn entuziasmulojn de la verda popolo kaj petas pardonon, se pri iu el ili nenio ridiga estas dirite en la Verda Biblio. (Sed ĝi povas esti laŭvole daŭrigata!)

En la dua parto ni legas „Babiladon kun Horaĉo Serĉer", kiu prezentas sin: „Nu, mi estas verdire malnova esperantisto, sed mi ne parolas Esperante!" Tamen H. Serĉer senĉese naskas ideojn, proponas revolucion por havi nur purrasajn esperantistojn, rezignas postenon (ne volas esti elektita en komitaton por esti poste priklaĉata) kaj fine komencas kompili fakan terminaron por insultoj kaj malbenoj (ekzemple: esperantigita estu via edzino!).

La malamikoj de la iamaj kontraŭtalpaĵoj en „der esperantist"[1]) prefere ne risku novan koleratakon pro legado de la Verda Biblio. Tamen la libro certe trovos multajn ŝatantojn.

[1]) kp. „der esperantist" 20/21 (aprilo 1963); 22/23 (aŭgusto 1968); 25 (oktobro 1968); Mendu ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9.

Linde Knöschke

Interfake — nova bulteno

Aperis jam la 10a numero de „Interfake", „Komuna Bulteno de ĉiuj Fakaj Asocioj". Per tiu 10a numero la bulteno unuan fojon presiĝis en Hungario. Ĝi estas komputista numero, kompilita de d-ro Péter Broczkó kun kunlaborantoj. La ege informriĉa 46-paĝa bulteno (A 5) entenas enkondukon pri la celo de „Interfake".

Jen ni legas:

Tial, ke granda parto de la faka agado okazas ekster la fakaj asocioj, Interfake publikigos informojn ankaŭ pri la laboro de ĉiaspecaj fakaj kaj studentaj rondoj, kaj eĉ de individuoj, se tiuj informoj ŝajnos utilaj por la ĝenerala faka agado.

Sekve ĉiuj fakaj organizoj kaj ankaŭ individuaj personoj, okupigantaj pri la faka aplikado de Esperanto estas petataj sendi regule al Interfake informojn pri:
— viaj ĉefaj laborterenoj
— eldona agado
— tradukado de fakaj tekstoj
— terminologia agado, vortar-kompilado
— kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj
— kiu konkrete faras la menciitajn laborojn
— kian helpon vi bezonas
— kian helpon vi ofertas kaj al kiu
— rilatoj kun aliaj organizoj (esperantistaj kaj neesperantistaj)
— rilatoj kun la nacilingva faka gazetaro
— kiom da membroj havas la organizo kaj en kiuj landoj
— kiel aliĝi al via organizo
— aliaj gravaj informoj.

La nuna entenas plue jenajn artikolojn: Laborterenoj por komputistoj / pri nova tradukservo / laŭlanda komputista reprezentanto-reto (el GDR: Michael Behr, 7113 Markkleeberg, Koburger Straße 83) / komputistaj kunvenoj en 1981 / PREDIS (**P**lanlingva **Re**trova **Di**alog-**s**istemo) / Pri la perkomputila agado de Budapeŝtanoj / Esperanto — kiel programada lingvo / Tekstoprilaboro. Fonto kaj medio: Esperantaj tekstoj / Kiu kion faras / Novaĵoj / Samfakuloj serĉataj / Internaciaj komputadaj kursoj en Budapeŝto 1981.

La redaktoro de Interfake estas András Lukács, Budapest, Pf. 193, H-1368. Prezo aŭ aboneblo ne estas indikita.

Alvoko al esperantistaj tradukistoj

Multaj esperantistoj agas en la kadro de internaciaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ esperantistaj tradukistoj (tradukantoj) devus grupiĝi por kunordigi la individuajn laborojn, organizi internaciajn kongresojn kaj seminariojn, en kunlaboro kun UEA kaj FIT (Internacia Federacio de Tradukartistoj), publikigi artikolojn kaj verkojn pri la tradukarto, interŝanĝi spertojn pri la tradukado de beletraj, sciencaj, popularsciencaj, teknikaj, publicismaj kaj ĉiufakaj tekstoj.

Por fondi internacian asocion de esperantistaj tradukistoj mi petas rimarkojn, proponojn, opiniojn, projekton de la statuto kaj aliajn materialojn. Ciujn kontribuaĵojn bonvolu sendi al jena adreso: s-ro Zbigniew Czupkallo, PL-Niedrzwica Duza, Pollando.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario

Panja Stefanova Ivanova, urbo **Prjavna 5350,** str. „P. Bogdanov“ 57a, (20j.), dez. kor. tutmonde kun junuloj

47jara oficisto en Nacia Biblioteko de Bulgario dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. kolorajn bk, poŝkalendaretojn: Ivan Gjuzelev, bul. Petko Todorov, bl. 11, vh. A, **1408 Sofio**

Studento de pedagogio dez. kor. kun kolegoj el GDR pri sporto, muziko, fotografado: Valentin Razaivanov, **1111 Sofio-11,** str. „Geo Milev-25“, ap. 7

ČSSR

Jan Švec, Sučilova 1335/27, **755 01 Vsetin,** (28j.), dez. kor. kun geesp. el GDR pri turismo, kol. gramofondiskojn

55j. laboristo dez. kor. p. ĉ. t., kol. bk: Ladi Kralovec, n-ro 77, **34532 Ceska Kubice**

55-jara oficistino, dez. kor.: Jarmila Rakszawska, Luxemburgové 8, **736 01 Havířov-Město**

45j. konstruseruristo dez. kor. pri fotografado, migrado, kuirado, teatro, sporto, libroj: Ladislav Dvoran, **391 02 Sezimovo Usti II,** Khajence 675/A

GDR

Komencanto, 26j., dez. kor. p. ĉ. t. prec. pri jazo, kol. pm, bk: Matthias Reimann, **5503 Ellrich,** Bahnhofstr. 3

Instruistino (komencantino), 39j., dez. kor. p. ĉ. t.: Heide Teichler, **2801 Zierzow** Kr. Ludwigslust

Studentino (komencantino), 19j., dez. kor. pri lingvoj, folkloro: Ulrike Kloock, **2801 Tewswoos,** Straße der Jugend 1

Bakisto (komencanto), 34j., dez. kor. pri fotografado, kuirreceptoj, motorciklaj konkursoj: Peter Awe, **2801 Zierzow,** Grabower Chaussee 9

Soveta Unio

Geesperantistoj el **660 075 Krasnojarsk** dez. kor.:

1. Andreeva Nina, 18-j., str. Lebedeva 31-179 (kun Pollando, Anglio pri ĉt)
2. Blohina Elena, 23-j., str. Surikova 53-53 (kun GDR, Anglio pri ĉt)
3. Viktoruk Nataŝa, 23-j., str. Kurĉatova 1-41 (kun GDR, Pollando pri ĉt)
4. Gaputin Vladimir, 20-j., p.k. 2420 (tm pri tekniko, muziko)
5. Gorbatenko Elena, 18-j., Divnogorsk p.k. 518 (kun kapitalistaj landoj pri ĉt)
6. Danilin Igorj, 23-j., str. Karbyŝeva 10„A“-77 (tm pri politiko, ekonomiko, problemoj de paco)
7. Dubinina Elena, 20-j., str. 1-a Krutogorskaja 6-1 (kun GDR, Hindio pri ĉt) (kun Pollando, Bulgario, Anglio pri ĉt)
8. Erŝova Elena, 22-j., str. Sĉorsa 3-26
9. Epina Marina, 26-j., str. Moskovskaja 3a-49 (tm pri sporto, E-literaturo, interŝ. bk)
10. Juravljov Aleksej, 25-j., str. Kalinina 78a (kun GDR, Bulgario pri muziko, literaturo)
11. Juravljov Vladimir, 22-j., str. Kalinina 78a (kun Usono, Japanio pri E-temoj)
12. Zdorenko Aleksandr, 20-j., Severnyj proezd 11-35 (tm pri ĉt)
13. Laptev Vladislav, 20-j., p.k. 2420 (kun Bulgario, Aŭstrio, Francio, Anglio pri nigra-blanka fotografio, medicino, esperantaĵoj)
14. Petrov Anatolij, 18-j., av. Krasnojarskij rabočij 69-63 (kun Bulgario, GDR pri ĉt)
15. Narbekova Ljudmila, 19-j., p.k. 2420 (kun Bulgario kaj Japanio pri fotografio, esperantaĵoj)
16. Nevmatulin Nail, 21-j., str. Kirenskogo 22 (kun Japanio)
17. Smolencev Viktoro, 29-j., p.k. 2420 (kun Japanio, Aŭstralio, Usono pri abelbredado, radiotekniko)
18. Stepanova Irina, 25-j., str. Mojajskogo 6-8 (tm pri belarto, esperantaĵoj, turismo)
19. Šatalov Jevgenij, 15-j., str. Totmina 16-69 (tm pri medicino, bk)
20. Carjova Zoja, 19-j., str. Totmina 16-40 (tm pri ĉt)

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 495